Heinrich Heine,

## Belŝacar'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ripozis pace jam Babel'
Dum meza nokto, en malhel'.

Nur supre en la reĝkastel'
Vidiĝis flagre torĉa hel'.

Kun sia reĝ-korteganar'
Festenis tie Belŝacar'.

Jen malplenigante pokalojn kun vin'
De l' reĝ' servistaro amuzas sin.

Ĝojigis la reĝon de l' glasoj tintad'
Kaj de la servistoj gajega kriad'.

La reĝo ardis pro la vin',
La vino aŭdacigis lin.

Tentate de la aŭdacem'
Li diras vortojn de blasfem'.

Senhonte la reĝo gloras sin,
La servistar' aplaŭdas lin.

Vokite de l' fiera reĝ'
Servist' ekstaras de la seg',

Alportis li multon da ora ilar'
Rabitan for de l' Javea altar'.

. . .

Heinrich Heine,

## Belŝacaro

*tradukita de Richard Schulz*

Jam pasis de la nokt' duon'.
Trankvile kuŝis Babilon'.

Nur supre en la reĝkastel'
Fenestrojn traflagras torĉa hel'.

Reĝ' Belŝacar' de Babilon'
Festenis en la festsalon'.

Tumultis laŭte de l' reg' sekvantar'.
Tintigis pokalojn barbar' kun barbar'.

La reĝo aŭskultis obstine kun ĝu'
La virojn jubili, pliiĝon de l' bru'.

Ekardas tre la reĝa vang'.
Riskemas tre la reĝa lang'.

Kaj senpripense pekas li
Kaj blasfemas terure, spitante al Di'.

Kaj paradas sen hont' kaj kun defi'.
Aplaŭdas tre la koteri'.

Orgojle sonas de l' reĝ' ordon'.
Jam hastas kaj revenas peon'.

Surkape pezas la ora vazar',
El templo Javea la rabakapar'.

. . .

Heinrich Heine,

## Belsazar

Die Mitternacht zog näher schon;
In stummer Ruh lag Babylon.

Nur oben in des Königs Schloß
Da flackerts, da lärmt des Königs Troß.

Dort oben in dem Königssaal
Belsazar hielt sein Königsmahl.

Die Knechte saßen in schimmernden Reihn,
Und leerten die Becher mit funkelndem Wein.

Es klirrten die Becher, es jauchzten die Knecht';
So war es dem störrigen Könige recht.

Des Königs Wangen leuchten Glut;
Im Wein erwuchs ihm kecker Mut.

Und blindlings reißt der Mut ihn fort;
Und er lästert die Gottheit mit sündigem Wort.

Und er brüstet sich frech und lästert wild;
Der Knechte Schar ihm Beifall brüllt.

Der König rief mit stolzem Blick;
Der Diener eilt und kehrt zurück.

Er trug viel gülden Gerät auf dem Haupt;
Das war aus dem Tempel Jehovas geraubt.

. . .

| | | |
|---|---|---|
| Kaj sanktan pokalon per peka man'<br>Ekkaptis la reĝo, vokante: „Je l' san'!“ | Kaj ekprenis la reĝ' per krima man'<br>La plej sanktan pokalon kun fia rikan'. | Und der König ergriff mit frevler Hand<br>Einen heiligen Becher, gefüllt bis am Rand. |
| Kaj malplenigis li tiun ĉi,<br>Kun buŝo ŝaŭmanta elvokis li: | Kaj li malplenigas ĝin ĝis la fund',<br>Kriaĉas el malvirta abund': | Und er leert ihn hastig bis auf den Grund,<br>Und er rufet laut mit schäumendem Mund: |
| „Jave', je eterno mi mokas vin, -<br>Regant' de Babelo mi nomas min!“ | "Javeo, mi mokas pri via kron' -<br>Mi estas reĝo de Babilon'!" | "Jehova! dir künd' ich auf ewig Hohn –<br>Ich bin der König von Babylon!“ |
| Apenaŭ tion eldiris li,<br>Ektimon sentis li en si. | Apenaŭ sonis for la vort',<br>La reĝon ekkaptis la tim' de l' mort'. | Doch kaum das grause Wort erklang,<br>Dem König wards heimlich im Busen bang. |
| Mutiĝis la rido en unu moment',<br>De l' morto regis la silent'. | La akra ridado formortis je l' hor'.<br>Silentis tuj la vira ĥor'. | Das gellende Lachen verstummte zumal;<br>Es wurde leichenstill im Saal. |
| Kaj jen! Kaj jen! Sur blanka mur'<br>de man' aperis la kontur'; | Jen vidu! el la blanka mur'<br>Aperis homa mankontur'. | Und sieh! Und sieh! An weißer Wand,<br>Da kam's hervor wie Menschenhand; |
| Kaj skribis, kaj skribis sur la mur'<br>Literojn el fajr' kaj foriĝis de sur. | Kaj skribis, skribis sur la mur'<br>Kaj ree foriĝis post flamgravur'. | Und schrieb, und schrieb an weißer Wand<br>Buchstaben von Feuer, und schrieb und verschwand. |
| Genu-tremante sur sia seĝ'<br>kadavre pala jen sidis la reĝ'. | Jen ankaŭ for regal-plezur'.<br>Rigide rigardis la reĝ' pro terur'. | Der König stieren Blicks da saß,<br>Mit schlotternden Knien und totenblaß. |
| La korteganoj pro terur'<br>Silente sidis, spiris nur. | La viroj sidis mutaj pro tim'.<br>Horor' sentiĝis en ĉies anim'. | Die Knechtenschar saß kalt durchgraut,<br>Und saß gar still, gab keinen Laut. |
| La magiistoj vokitaj de li<br>Ne povis klarigi tion ĉi. | Eĉ magoj ne sciis laŭ rita mezur'<br>Klarigi la flamskribaĵon de l' mur'. | Die Magier kamen, doch keiner verstand<br>Zu deuten die Flammenschrift an der Wand. |
| . . . | . . . | . . . |

Murdata estis Belŝacar'
Samnokte de sia servistar'.

*Traduko de la Germana poemo "Belsazar" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1984-03-30.*

*MR-109-2 / Arg-205-408 (2004-03-10 11:49:13)*

En tiu ĉi nokt', de la servistaĉar'
Murdata estis Belŝacar'.

*Traduko de la Germana poemo "Belsazar" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Richard Schulz *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-205-409 (2013-02-26 15:10:47)*

*Tiu traduko aperis en 1984 en la n-ro 61, 1984/7 de la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiun Richard Schulz, kiu nomis sin Rikardo Ŝulco, eldonis mem. Li indikis kiel aŭtoron de la germana-lingva originalo: Henriko Hajno. Tiu estas la germana poeto Heinrich Heine. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`.

Belsazar ward aber in der selbigen Nacht
Von seinen Knechten umgebracht.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-205-407 (2004-03-06 17:43:12)*